

35a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO  
Barcelono 28a/29a/30a/31a de oktobro 2011

---

# KONGRESLIBRO

---

**ESPERANTO\***  
**CAT**

\*Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio





Karaj gekongresanoj,

Cent ses jarojn post la kongreso de Aplec Esperantista de Catalunya, praKKE, kaj dudekkvar jarojn post la 23a Kataluna Kongreso de Esperanto, ni, la kataluna esperantistaro, denove renkontiĝas en nia princlanda ĉefurbo. Kiel barcelonano, estu ĉiuj bonvenaj al mia urbo!

Permesu al mi esti iom sentimental: la 23a estis la unua KKE, en kiu mi partoprenis kaj nun, post preskaŭ kvaronjarcento, mi unuafoje enkondukas la kongreslibron kiel prezidanto de KEA. Mi fieras pri tio, sed ne pri mia prezidanteco, kiu estas tute cirkonstanca, sed pro la laboro farita de nia asocio dum tiuj jaroj, kaj eĉ de antaŭe. En 1987, mi memoras, KEA devis alfronti novajn defiojn... nun la defioj adas, sed tio estas normala afero, ĉar nia asocio implikiĝis kaj implikiĝas en nia socio. Mi ne povas kompreni KEA alimaniere: nia asocio nur havas sencon, se ĝi estas viva, se ĝi estas en konstanta rilato kun la socio, en kiu ĝi enradikiĝas, se ĝi transformiĝas same kiel transformiĝas nia socio. Kaj nia asocio estas tia, kian montras, ekzemple, niaj agadoj ekde la lasta KKE en Sabadell: renovigo de *Kataluna Esperantisto*, nun katalunlingva kaj kulture altnivela, aperigo de nova esperantlingva informilo *Esperanto\*info*, eldono de rigora dulingva “*Història de l’Esperanto als Països Catalans - Historio de Esperanto en la Kataluna Landaro*”, enretigo de tute aktualigita [www.esperanto.cat](http://www.esperanto.cat) bel- kaj modernaspekta, kunlaboro en la revigligo de la Esperanto-muzeo en Subirats, solena festado en 2010 de la centjariĝo de nia asocio, ktp... Ni agadis, ni agadas, ni agadu, ĉar ni estas vivaj.

Jes, certe, mi ankoraŭ ne parolis pri la programeroj de la kongreso, do, ek al ĝi. Malgraŭ la krizo, nia asocio kapablis organizi buntan programon ĉirkaŭ grava temo: plurlingvismo en Eŭropa Unio. Mi pensas ke la programo iĝos vin partopreni kaj eble eĉ kuraĝigos vin pli engaĝiĝi en nia asocio: ni bezonas ĉies kunlaboron por plifortigi nian asocion. Kiel dirite, la ekonomia krizo ĝenis la organizadon de la kongreso, sed fakte la krizo en kiu nia socio troviĝas estas pli morala ol mona, kaj en tiu senco tiu kongreso montras kion interlingvo Esperanto kaj esperanta kulturo povas proponi al la socio, en kiu ili disvolviĝas. Niaj valoroj, niaj principoj —lingvaj rajtoj, rajto al plena komunikado inter homoj kun diversaj lingvoj, lingva egaleco, lingva diverseco— povas helpi al la ŝanĝoj kiujn la mondo bezonas: ni estu utopiaj, ni sciiĝu kion ni povas proponi, ni montru niajn kulturajn valorojn... per ĉiu vojo ebla, ankaŭ per tiu-ĉi kongreso... partoprenu ĝin, ĝuu ĝin, vivu ĝin.

Carles Vela Aulesa  
prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio

# LOKA KONGRESA KOMITATO

- Alfons Tur
- Carles Vela
- Dani Cortijo
- Lluís Aragay
- Ferriol Macip
- Mon Cardona
- Ramon Perera
- Ramon Rius
- Víctor Solé

## Infana programo:

- Gemma Armadans
- Montserrat Franquesa



### Eksterkongresejaj programeroj

Dimanĉe la kongreso proponas programerojn tra la urbo, la kongresejo estos, do, fermita.

1. Je la 10a renkontiĝo antaŭ la kongresejo.
2. Je la 16a renkontiĝo en la centro de placo Catalunya.
3. Je la 19a renkontiĝo en kafejo Horiginal, strato Ferlandina 29, antaŭ muzeo pri moderna arto MACBA.

## **LA KONGRESEJO**

---

La kulturcentro La Farinera del Clot estas urba kulturdomo prizorgita de la Federacio de Asocioj de la kvartaloj Clot-Camp de l'Arpa per civitana administrado. Ĝi situas en la kvartalo Clot, distrikto Sant Martí. Ĝi staras facile alirebla loko, ĉe placo Glòries, kiun prezidas la emblema turo Agbar.

La Centro proponas soci-kulturan programaron dum la tuta jaro kie elstaras teatro kaj muziko. Krome, la Centro specialiĝas en asocia movado.

La trinkejo estas porvegetarana. Se vi deziras manĝi tie, bv. antaŭanonci tion, ne hezitu peti helpon de la kongresaj organizantoj.

Adreso: Gran Via de les Corts Catalanes, 837

Metroo: linio 1, haltejo Glòries

Tramo: linio T5, haltejo La Farinera

Urbaj busoj: 7, 56, 60, 92, 192

## **POEZIA KAFEJO HORIGINAL**

---

Horiginal (kafejo kaj poezio) fondiĝis antaŭ 10 jaroj kiel trinkejo kaj renkontejo por poetoj kaj poezi-satantoj. Sen perdi la artistan saporon ĝi kreskis kaj proponas pli da servoj kaj aranĝoj.

Nuntempe ĝi fariĝis restoracio proponanta tradiciajn saporojn laŭ bazara kuirejo. Krom la manĝosalonoj kaj la teraso, tiuj antaŭ la muzeo pri modernarto (MACBA), Horiginal havas privatan salonon por aranĝoj.

La ejo ankaŭ spertas je vinoj, gustumebaj aŭ aĉetebaj laŭ vendeja kosto. En ĝi kunvenas ĉiumarde asocio por amantoj de la vin-kulturo. Krome, la asocio H.O.R.I.N.A.L. organizas poeziajn vesperojn ĉiumerkrede.

La poezia kafejo Horiginal gastigos kelkajn kongresajn programerojn: korusan koncerton, dimanĉe je la 19a; la poezian vesperon, dimanĉe je la 21a kaj la kongresan bankedon, lunde je la 14a.

Adreso: Ferlandina, 29

Metroo: linio 1, haltejo Universitat

Urba buso: 120

## SALONOJ

---

**Jaume GRAU CASAS** (Barcelono 1896 - Valencio 1950) estis kataluna poeto en Esperanto. Esperantisto de 1914, li estis redaktoro de *Kataluna Esperantisto* inter 1920 kaj 1924, kaj longe aktivis kiel prezidanto aŭ sekretario de la Internaciaj Floraj Ludoj, kies Natura Floro (ĉefa premio) li gajnis en 1919 kaj 1936. Membro de la Lingva Komitato ekde 1926 kaj vicprezidanto de la Akademio de Esperanto. Li estis enkarcerigita pro sia katalunismo en 1934 kaj denove en 1938. Post la fino de la milito li ekziliĝis al Francio, kie li pasigis la unuajn kvin jarojn en diversaj koncentrejoj. Dum tiu li skribis diversajn artikolojn, kelkaj el kiuj aperis en la tiama gazetararo. En 2008 lian personan arkivon transprenis Kataluna Esperanto-Asocio. Lia frato **Josep GRAU CASAS**, 8 jarojn pli aĝa estis lia plej fidela kunlaboranto.

**Delfi DALMAU i GENER** (Figueres 1891 - Barcelono 1965) estis kataluna esperantisto, lingvisto, kaj instruisto de la kataluna, hispana, franca kaj angla lingvoj. Fondinto de Dalmáu-Liceo en Barcelono, 1920, kun filioj en kvin aliaj urboj. Plurfoje komitatano kaj prezidanto de Kataluna Esperanto-Federacio (1924-1928). Premiito kaj juriano de la Internaciaj Floraj Ludoj. Aŭtoro de du katalunaj romanoj kaj pluraj eseoj, kaj de avangarda pedagogiaj verkoj por la kataluna (i.a. la unua surbendigita lernomaterialo, en la 1930-aj jaroj, kun la voĉoj de Pompeu Fabra kaj Mercè Rodoreda). En 1933 li fondis la katalunlingvan semajnan kulturan gazeton *Clarisme*, kie rege aperis materialoj pri esperanto, i.a. tradukoj el ĝi (nemalofte kiel punta lingvo). Post la milito li estis kondamnita al dudek jaroj da mallibero pro sia katalunisma aktiveco, el kiuj li efektive pasigis en karceroj jaron kaj duonon. Li estas konsiderata unu el la fruaj aŭtoroj de sociolingvistiko.

**Joan AMADES i GELATS** (Barcelono 1890 - 1959) estis kataluna esperantisto, publicisto kaj folkloristo. Pro siaj esploraj verkoj pri folkloro kaj popoldanco, li estas konsiderata la ĉefa nacilingva aŭtoritato pri kataluna folkloro. Esperantisto de 1907, kunfondinto kaj prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio, kunorganizinto de la Universala Kongreso en Barcelono. Eldonis milojn da diversaj, artaj Esperantaj sigelmajloj kun 243 diversaj bildoj.

**Manuel CASANOVAS i CASALS** (Olesa de Montserrat 1927 - Barcelono 2010) estis kataluna esperantisto, klaretano kaj pacisto. En 1939 li decidis fariĝi klaretano kaj en 1944 li eldiras la unuajn voĉojn. Pli poste, en 1961, sendite al Britio, li legis anoncon en la gazetararo rilatantan al la tuja fondiĝo de Amnestio Internacia kaj li aliĝis al la iniciato. En 1962 la revuo *Amnesty* publikigis subpseŭdonime artikolon lian pri la subpremo de la frankisma reĝimo kontraŭ Katalunio. Kiam la politika situacio ebligis la refondiĝon de la Kataluna Esperanto-Asocio, li fariĝis ĝia unua prezidanto (1980-1986). Ĝis lia forpaso li estis la reprezentanto en Hispanio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). Manuel Casanoves aktive partoprenis en la starigo de la sekcio de Amnestio en Hispanio kaj akceptis fariĝi ĝia unua prezidanto (1978).

## UTILAJ INFORMOJ

---

Skipo de helpantoj pretas informi kaj helpi kiam ajn pri kio ajn. Ili estas facile rekonblaj per sia kongressildo.

### **Moviĝi tra Barcelono**

Sendube Barcelono estas granda urbo kiu invitas la vizitanton promeni tra siaj stratoj. Tamen vi certe bezonos veturi per publika transporto el la kongresejo ĝis via gastejo, el via plej ŝatata turismaĵo al renkont-punkto.

Barcelono proponas plurajn publikajn transportojn.

La kosto de unu bileto estas 1,40 eŭroj. Indas, tamen, aĉeti karton T-10 kiu proponas 10 unuopajn veturojn en kiuj ajn publika transporto kun rajto ŝanĝi la veturilon senpage dum unu horo kaj 15 minutoj. Ĝi kostas 8,25 eŭrojn por 10 veturoj.

La transport-kompanio proponas plurajn aliajn bilettipojn. En la aĉetmaŝinoj vi trovos ĉiun informon en la kataluna, la hispana, la angla kaj la franca.

Aĉetu ĉiam biletojn por unu zono, krom se vi iras al ekstera urbo kiel ekzemple Sabadell (2 zonoj) aŭ Mataró (3 zonoj).

#### **Metroo**

La urba metroo funkcias ekde la 5a ĝis noktomezo, vendrede ĝis la 2a matene kaj sabate ĝi funkcias la 24 horojn. Vi ankaŭ povas preni metroecajn trajnojn de la trajnkompanioj FGC kaj RENFE per la sama bileto.

Metrohaltejo de la kongresejo: Glòries (linio 1)

#### **Tramo**

La tramoj estas verdaj kaj blankaj, ili komunikas la urbon kun eksteraj kvartaloj. Vidu horarojn en la haltejoj.

Tramhaltejo de la kongresejo: La Farinera (linio T5)

#### **Busoj**

En Barcelono estas 109 urbaj busoj trakurantaj 920 kilometrojn. Proksime al la kongresejo haltas la busoj n-ro: 7, 56, 60, 92, 192. Nokta buso: N2


## Mangî kaj trinki

La trinkejo de la kongresejo proponas porvegetaranajn nutraĵojn. Ĝi estas, tamen, malgranda kaj estas konvene antaŭanonci al la trinkejanoj vian deziron mangî tie. Kongreshelpantoj povas helpi vin.

Proksime al la kongresejo, ĉefe laŭ la unua maldekstra strato elirinte la konstruaĵon, estas pluraj bonprezaj restoracioj ĉiuspecaj. Antaŭ la kongresejo, trans la granda strato, estas komerca centro Glòries, kie vi ankaŭ trovos, krom vendejojn, trinkejojn kaj manĝejojn.

## La strato Zamenhof

1,6 kilometron for de la kongresejo (20 minutojn piede) estas strato Zamenhof. Temas pri eta strato. Nenion specialan vi trovos en la strato krom modesta murŝildo dediĉita al doktoro Zamenhof. Ĝi estis starigita fine de la frankisma periodo kaj tial ĝi estas en la hispana lingvo, tiutempe deviga. Sur la ŝildo, ekstremluksuraj grupoj skribis ksenofobiajn mesaĝojn atake al la judeco de la majstro. Ili estis purigitaj de kvartala anarĥiisma anaro.





## PODIULOJ

**Abel MONTAGUT i MASIP** (1953) estas mezlerneja instruisto pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. Li verkas en esperanto kaj en la kataluna. Lia plej fama verko en esperanto estas la eposo *Poemo de Utnoa* (1993). En la lastaj jaroj li laboras ĉefe pri junularaj romanoj kaj aparte interesiĝis pri la figuro de Jules Verne, al kiu estas ligita lia lasta romano en la kataluna *El manuscrit de Jules Verne* (2003). Samtempe, li estas ankaŭ kundirektoro de la Kolekto Delfi Dalmau, de KEA, kiu publikigas tekstojn en rilato al la lingvaj rajtoj kaj la lingva diverseco.



*Abel Montagut i Masip*

**Carles VELA i AULESA** (1969) estas esploristo pri mezepoka historio en Institució Milà i Fontanals-CSIC (Barcelona), estas korusestro de TutPEKo kaj Cor Acord inter aliaj korusoj kaj membro de la ensemblo Kaj Tiel Plu.

**Guillem SEVILLA i TRUJILLO** (1983) estas grafikisto. Li dezajnas librojn, retejojn, logotipojn, kompaniajn identigajn grafikajojn kaj fakulas pri tipografio. Li kreis en 1994 la simbolon de la centjariĝo de UEA, la nuntempan grafikan aspekton kaj la retejon de Kataluna Esperanto-Asocio. Li ankaŭ studas katalunan filologion.



*Carles Vela i Aulesa*

**Jordi SOLÉ i CAMARDONS** (1959) estas socilingvisto kaj aŭtoro de pluraj famaj verkoj en lia fako laŭ la ekolingvisma paradigmo: i.a. *Diccionari de sociolingüística*, *El poliedre sociolingüístic*, *Història social i política de la llengua catalana*, *Les set tribus de la nació catalana*. Li eseis ankaŭ pri Delfi Dalmau, prezidinto de Kataluna Esperantista Federacio, en sia verko *Poliglotisme i raó: el discurs ecoidiomàtic de Delfi Dalmau*, kies resuman tradukon publikigis KEA sub la titolo *Delfi Dalmau: katalunismo, liberanismo kaj esperantismo*. Li kreis la eldonejon Voliana kies unua libro estis reeldono de la verko de Delfi Dalmau: *Poliglotisme passiu* kiun li prezentos en la kongreso.



*Jorge Camacho Cordón*

**Jorge CAMACHO CORDÓN** (1966) estas verkisto, kies ĉefaj verkoj estas: eseo *La liturgia de l' foiro*; rakontoj en *Sur la linio* kaj *Ekstretoj*, prozaĵo *La ĉapo de la sterko-vermo*, novelo *La Majstro kaj Martinelli*; poemaroj *Celakantoj*, *Saturno*, *Eklipsas*, *Koploj* kaj *filandroj* kaj *La silika hakilo*.



Katalin Kováts

Tradukis *Letero el Palestino* de Santiago Alba. Ĉefredaktas la literaturan revuon *Beletra Almanako*.

**Katalin KOVÁTS** (1957) estas hungara doktoro pri lingvistiko, metodologo, verkinto de kelkaj lerniloj kiel *Poŝamiko* aŭ *Ĉu vi aŭdis, ke...?* kaj redaktoro de la porinstruista retejo *www.edukado.net*. Ekde 2001 ŝi vivas en Nederlando de kie ŝi pere de sia paĝaro efike nutras kaj helpas tutmonde la instruantojn de Esperanto. Ŝi instruas ne nur rete, sed ofte gvidas ankaŭ ĉeestajn seminariojn kaj kursojn, inter aliaj ekzemple en Poznan, en la interlingvistikaj studoj, ĉiujare dum UK-oj ktp. En la lastaj jaroj ŝi multe faris por la lanĉo de la ekzamensistemo laŭ la Komuna Eŭropa Referencadro kaj akceptigo de Esperanto ĉe la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo. Ŝi multe agadas ankaŭ por esploroj pri la vivo kaj laboro de Esperanto-instruistoj, rezulte de kiu lanĉiĝis la *Panteono de pedagogoj* kaj aperis en 2011 ŝia romano *Stelsemantoj en la ora nordo* pri la vivo kaj laboro de Tiberio Morariu, fama Cseh-instruisto de la tridekaj-kvardekaj jaroj.



Rubeno Fernández Asensio

Pro siaj pedagogia agado kaj sindona laboro por la enkonduko kaj okazigo de la novaj referencadraj ekzamenoj en Esperantujo, en 2010 ŝi estis elektita la Esperantisto de la jaro.

**Kevin DE LAET** (1981) venas el Antverpeno, Flandrio (norda Belgio). Li studis film- kaj sonarton kaj laboras kiel librotenisto en Flandra Esperanto-Ligo. Post la studperiodo ekinteresiĝis pri la belga kaj pri la ĝeneralaj lingvokonfliktoj kaj kiel ĵurnalisto por diversaj periodaĵoj sekvas la politikan situacion en Belgio kaj en Eŭropo.

**Michael Boris MANDIROLA** (1988) estas komputilingenierstudento el Piemonto (Italujo). Li eklernis esperanton en 2005 kaj ekestraniĝis en IEJ, itala sekcio de TEJO, en 2006 organizante plurajn Internaciajn Junularajn Festivalojn kaj aliajn eventojn, li ankaŭ rolis kiel vicprezidanto (2008-09) kaj prezidanto (2009-10). Li eniris la komitaton de TEJO en 2007, en 2010 iĝis komisiito pri eksteraj rilatoj kaj en 2011 estis elektita vicprezidanto respondeca pri eksteraj rilatoj.



Zlatko Tišljar

**Mon CARDONA** (1954) fakas pri dancoj kaj tradiciaj muzikoj de la tuta mondo. Li estas instruisto pri dancado kaj ludas diatonan akordionon kaj tradician katalunan fluteton. Li muzikas en du bandoj: “Tercet Treset” kaj “Sants & Fot”.

**Ramon RIUS i SANTAMARIA** (1976) licenciulo en kataluna filologio kaj diplomito en pluraj eŭropaj lingvoj.

**Rubeno FERNÁNDEZ ASENSIO** (1974) magistriĝis en la Universitato de Barcelono pri kataluna filologio, kaj pri aplikita lingvistiko en la Universitato de Havajo. Li instruis la hispanan lingvon kaj kelkfoje Esperanton en Suda Koreio, Japanio kaj Havajo. Nuntempe li laboras kiel lingvinstrua konsilanto por publikaj katalunaj lernejoj. Li interesiĝas pri la socilingva historio de Havajo kaj Katalunio, lingvopolitiko, kaj lingvinstruaj metodoj.

**Zlatko TIŠLJAR** (1945) studis ĉe la Filozofia Fakultato en Zagrebo ĝeneralan lingvistikon kaj germanan lingvon kaj poste ĉe AIS kibernetikan pedagogion (li magistriĝis per diplomlaboro pri propedeŭtika valoro de Esperanto). Li verkis plurajn sciencajn verkojn pri lingvistiko kaj pedagogio. Liaj ĉefaj originalaj verkoj estas »Eŭropa ideologio«, »Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj«, »Duobla spiralo« kaj »Eŭropo, vi baldaŭ mortos«. Li verkis ankaŭ lernolibrojn (ĉefaŭtoris la bazan lernolibron laŭ la Zagreba Metodo), verkis Instrukciaron por uzantoj de tiu metodo, B-lernolibron kaj du vortarojn (espertanto-kroatan kaj esperanto-slovenan).

Li multe vojaĝis kaj prelegis pri esperantaj kaj eŭropaj temoj. Liaj sciencaj verkoj aperis en deko da simpoziaj kolektoj kaj ankaŭ multaj artikoloj en diversaj E-gazetoj, plej multe en Monato kaj Eŭropa Bulteno.

Prezidanto de Jugoslaviana Junulara Esperantista Asocio de 1968-1977 kaj membro de komitato de TEJO. En 1972 li iniciatis kaj fondis entreprenon Internacia Kultura Servo en Zagrebo, kiun li direktoris ĝis 1991. IKS evoluis al entrepreno kun 10 enpostenigitaj kun signifa eldona agado (ĉiujare 3-5 libroj), kun ĉiujara profesia pup teatra internacia festivalo (PIF), kun organizado de sciencaj simpozioj, teatraj festivaloj, seminarioj. Li evoluigis ankaŭ la Zagreban Metodon kies lernolibro aperis jam en 35 lingvoj. Li estis membro de UEA-komitato de 1979 ĝis 1998. Ekde 1992 li loĝas en Maribor (Slovenio), kie li fondis entreprenon Inter-kulturo, kiu interalie organizis SAT-kongreson, REFon, Alp-adrian konferencon, sciencajn simpoziojn, tribunojn, festivalojn (2 Pupteatrajn festivalojn en Klagenfurt kaj iniciatis la festivalon La Strada en Graz en kiu li organizis ankaŭ internacian simpozion »Internacia familio – utopio aŭ realeco« en 1994) kaj eldonis pli ol 20 librojn. Li iniciatis fondon de Asocio por Eŭropa Konscio en 1996 kies sekretario li estas ankoraŭ nun. De 2001 ĝis 2009 li laboris en Popoluniversitato de Maribor kaj okupiĝis pri eŭropaj projektoj en edukado.

En 2000 li fondis Societon por Eŭropa Konscio en Zagrebo. Ekde 2005 li estas sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio kaj en 2007 prezidanto de organiza komitato de la 7a EEU-kongreso en Maribor. Li tradukis kelkajn romanojn kaj novelarojn el la kroata kaj slovena literaturoj al Esperanto..

# KONGRESA TEMO: PLURLINGVISMO EN EŬROPA UNIO

---

Eŭropa Unio difinas sian fundamenton en la principo de diverseco de kulturoj, moroj kaj kredoj; kie inkluziviĝas lingva diverseco, dum ĝi instigas la respekton al la kultura riĉeco kaj la protekton de la eŭropa kultura heredaĵo. Plurlingvismo en Eŭropa Unio estas regulata per la Traktato pri Eŭropa Unio (TEU), kaj per la Eŭropa Ĉarto pri Fundamentaj Rajtoj, kiuj devigas Eŭropan Unio respekti la lingvan diversecon kaj malpermesi diskriminacion pro lingvo. La principo pri diverseco estu aplikata al la 23 oficialaj lingvoj de la Eŭropa Unio kaj al la lingvoj konstituciaj, regionaj kaj minorigitaj, parolataj de la diversaj popoloj de la Eŭropa Unio.

Tamen, krom ĉiuj ĉi oficialaĵoj kiujn Eŭropa Unio asertas defendi kaj apliki, ni scias, ke en la praktiko la realo pretervidas la regularon. Tial granda parto de la eŭropaj lingvoj ne oficialaj suferas, fakte, lingvan marĝenigon en la Unio. Krome la angla elstare privilegiatas super oligarkio de privilegiataj ŝtatlingvoj. La ceteraj oficialaj ŝtatlingvoj estas en pozicio klare triaranga kaj minorigitaj lingvoj estas submetitaj al konstanta diskriminacio kaj batalo por propra supervivado.

En tiu ĉi kunteksto esperantistoj volas debati pri la ekzistantaj alternativoj al tiu situacio kaj la lingvaj politikoj kadre de Eŭropa Unio, kie la praktiko plene kontraŭdiras la principajn intencojn defendatajn de eŭropaj aŭtoritatoj. Ni proponas Esperanton kiel internacian lingvon, kiu permesas la interkomunikadon laŭ plena egaleco inter parolantoj de diversaj lingvoj, kiel ni pruvadas laŭlonge de antaŭ pli ol unu jarcento pere de la internacia lingvo.

Ni proponas Esperanton kiel solvon al internaci-komunikaj problemoj de la tuta mondo. Ĝi estas ankaŭ daŭripova, justa kaj demokratia propono por internaciaj organizaĵoj kaj aranĝoj.



# ELSTARAJ PROGRAMEROJ

---

## Prelegoj

### **Per què l'esperanto és tan atractiu?**

> Ramon Rius

Sala Joan Amades, divendres 28 d'octubre a les 18:00h

Quan s'és parlant nadiu d'una llengua hom no és mai prou conscient de com n'arriba a ser d'irregular la pròpia llengua. Només quan fem l'esforç d'aprendre una llengua estrangera ens fem conscients de la "falta de lògica" i de les "irregularitats" de la llengua d'altri. En l'aprenentatge d'una llengua sempre té més pes la memòria que la lògica.

Us imagineu una llengua en què tothom es pogués sentir com a casa, racionalment, intuïtivament. On la lògica i la memòria anessin del bracet. Aquesta llengua és l'esperanto. Una llengua plàstica i creativa.

### **Lingva politiko de EU:**

#### **Kontraŭdiro inter proklamita justo kaj praktikata maljusto**

> Zlatko Tišljarić

Salono Grau Casas, sabaton la 29an de oktobro je la 10:30a

En Europa Unio oni proklamis lingvan juston per la Europaj Traktatoj en kiuj oni leĝigis tion ke nacia lingvo de ĉiu lando eniranta EU-on fariĝas oficiala. Tio ŝajnis justa en la komencoj de EU kiam estis unue nur kvar lingvoj kaj poste malrapide kreskis. Sed oni ne antaŭvidis ke preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj krom la lingvo de la plej granda nacio havas ankaŭ plurajn aliajn lingvojn, ĉu de minoritatoj, ĉu de popoloj kia ekz. la kataluna. Ju pli kreskis Eŭropa Unio des pli kreskis la maljusteco tiunivele, ĉar la leĝigo de nur unu lingvo por ĉiu ŝtato ĵetis en duarangan pozicion dekojn da lingvoj kiuj ne havas oficialan statuson. Por iom mildigi la problemon, oni enkondukis duonoficialajn lingvojn. Laŭ tiu ebleco, ĉiu lando kiu volas havi pliajn oficialajn lingvojn povas postuli tion en la senco de duonoficiala lingvo, kio signifas, ke la kostojn de tia statuso kovros la lando proponinto. Tiel nun en EU ekzistas ses duonoficialaj lingvoj, inter kiuj la kataluna.

Tamen, la ĉefa maljustaĵo ne okazis kadre de proklamo de la oficialaj lingvoj. La maljustaĵo okazas pro la ekzisto de laboraj lingvoj kies reguligo neniel estis leĝigita kaj kiu efektive diktas la lingvan praktikon en EU. Pri la laborlingvo decidas la organizantoj de internaciaj aranĝoj depende de tio kiom da mono ili havas por interpretaj bezonoj de la konferencoj kaj aranĝoj. Plej ofte oni ne havas multan monon kaj la laborlingvoj estas du aŭ unu. Se estas du, kutime estas la loka lingvo de organizanto kaj la angla. Se estas unu, estas la angla. Se estas tri aŭ pluraj, ĉiam estas la angla inter ili. Tio logike konsekvencigas junajn eŭropanojn, ke kono de malgranda lingvo ne ebligas al ili partopreni en la konstruado de EU, sed tion ebligas nur la angla. Tial la ĝenerala premo al la lernejoj far gepatroj estas: lerni nur unu fremdlingvon: la anglan kaj EU rapide evoluas al unulingveco en praktiko.

## **Edukado de kvarlingva infano: naĝado kontraŭ la fluo**

> Katalin Kováts

Salono Grau Casas, sabaton la 29an de oktobro je la 11:30a

La preleganto, hungara lingvisto, vivas jam de 10 jaroj kun sia edzo Sylvain Lelarge (franco) en Nederlando, kie ili lernigas sian nun 10-jaran infanon en nederlanda lernejo.

La paro, komunikiganta inter si nur en Esperanto, kreis multlingvan familion, kio en si mem kongruas kun la ideala modelo de la moderna EU. Ilia kvarlingva infano estis dekomence konsiderata en la lernejo “problema kazo” kion kaŭzis ĝuste lia kvarlingveco.

Kiel lernejsistemo povas (mal)motivi plurlingvajn infanojn? Kiel konservi, eĉ pluperfektigi la plurlingvecon de infanoj familie kaj socie?

Respondoj al tiuj ĉi demandoj, prezento de konkretaj spertoj kaj propono de faren-daj oficialaj paŝoj formas la enhavon de la prelego de profesorino Kováts.

## **Kiel verki, traduki kaj legi poemojn**

> Jorge Camacho

Salono Grau Casas, sabaton la 29an de oktobro je la 12:30a

Jardekoj pasis post la 3 ĝisnunaj eldonoj de *Parnasa gvidlibro*, tamen multaj homoj poezion ĝenerale, kaj la E-poezion konkrete, plu verkas, tradukas kaj eĉ legas per tiu modelo jam delonge eksa kaj velka en la “normala mondo”.

# Atelieroj

## Poezia komisiono

> Jorge Camacho

Salono Delfi Dalmau, sabaton la 29an de oktobro je la 10:30a

Salono Grau Casas, lundon la 31an de oktobro je la 10:30a

Komplemente aŭ paralele al la teoria prelego pri poezio, jen praktikejo kie ni kundiskutu ĉiajn demandojn ligitajn al legado, tradukado aŭ verkado de poezio. Oni bonvolu kunporti ŝatatajn aŭ abomenatajn poemojn, ĉu proprajn aŭ fremdajn, originalajn aŭ tradukitajn, same kiel demandojn pri ajna temo aŭ temero koncernanta la poezian arton. Bonvenas ankaŭ proponoj por prezentado aŭ deklamado kadre de la Poezia vespero.

## Defioj de la nuntempa instruado de Esperanto

> Katalin Kováts

Salono Delfi Dalmau, sabaton la 29an de oktobro je la 18:00a

Kadre de la pelego Katalin donos resuman trarigardon pri la nuna monda situacio de la instruado de Esperanto, instituciaj Esperanto-kursoj, esperigaj oficialaj decidoj pri la statuso de Esperanto en kelkaj landoj. Malkovriĝos ankaŭ kelkaj pozitivaj lingvopolitikaj atingajoj en la medio de la Eŭropaj politikaj instancoj.

Helpe de la paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net), estrata de la prelegantino, la ĉeestantoj povos vidi detalajn statistikojn pri la kursoj, lernantoj kaj instruistoj, informiĝi pri ebloj trejniĝi pri instruado de Esperanto.

Katalin konigas ankaŭ la plej modernajn kaj konsilatajn lernilojn kaj diskutigos la partoprenantojn pri la strategioj por pli efike kaj pli grandskale instrui Esperanton en lernejoj medioj.

## Kongreseto

En Salono Manuel Casanovas, infanoj trovos ludejon. Prizorgantoj de la infanejo, ankaŭ okupiĝos pri la infanoj dum la aranĝoj ekster la kongresejo. Bonvolu demandi kaj interkonsenti kun la respondeculoj de la kongreseto.

## Koncertoj:

**JoMo** (Joan-Marc Leclercq) estas okcitana kantisto. Antaŭ longe li estis la kantisto de Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj), kiu eldonis du KD-ojn per la franca diskeldonejo Boucherie et Willins Production. Iliaj surscenigoj kreis varmegajn koncertojn tra la tuta Eŭropo. En 1996 formiĝis la bando JoMo kaj Liberecanoj, kiu kunigas punkan, rokan, skaan kaj popolan muzikojn. Lia lasta albumo estas la ĵus eldonita *Jomo Slavumas*.

Memstare JoMo proponas al ni longan muzikan spektaklon kun energia kaj festa muziko kun ritmoj foje 'rokabilaj', sed ankaŭ tradiciaj, slavaj, en esperanto, en la okcitana kaj en ĝis 22 lingvoj.

**Kaj Tiel Plu** estas kataluna esperanto-bando kreita en 1986 kadre de la Internacia Junulara Forumo en Castelfranco-Veneto. La ensemblo reorganizigis okaze de la Universala Kongreso okazinta en Montpeliero en 1998. De tiam la bando eldonis tri diskojn kaj koncertas kaj en Katalunio kaj en Esperantio.

La repertuaro de Kaj Tiel Plu baziĝas sur tradiciaj kantoj kaj dancoj de la Kataluna Landaro, Okcitanio kaj tutmondaj (inkluzivante muzikojn mezepokan, sefardan, trobadoran kaj aŭtorajn kantojn), en la originalaj lingvoj aŭ en esperanto.

**TutPEKO** (Tut-Pirenea Esperanto-Koruso) regule organizas en Okcitanio ekde junio 1991 staĝojn pri koruskanto en Esperanto. La celo de tiuj staĝoj estas helpi la praktikon de la lingvo internacia kaj diskonigi novan repertuaron.

De antaŭ kelkaj jaroj Carles Vela i Aulesa, korusestro, muzikisto en Kaj Tiel Plu kaj prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio, gvidas la staĝojn kaj estras la koruson. La aktiva partopreno de Carles Vela en tutPEKO igis la okcitanan koruson transpirena.

Dum la kongreso, la barcelona koruso **Cor Acord**, ankaŭ estrata de Carles Vela, fortigos la kantistojn de TutPEKO, proponante tiel kvalitan esperantlingvan repertuaron kun renesancaj, katalunaj, okcitanaj kaj sefardaj kantoj.

- > **Koncerto de JoMo**, vendredon la 28an de oktobro je la 22a en salono Grau-Casas
- > **Koncerto de Kaj Tiel Plu**, sabaton la 29an de oktobro je la 22a en salono Grau-Casas
- > **Koncerto de TutPEKO kaj Cor Acord**, dimanĉon la 30an de oktobro je la 19a en poezia kafejo Horiginal



# **Ekskursoj**

## **Omaĝo al Internaciaj Brigadoj**

> Dimanĉon la 30an de oktobro je la 11:30a en Fossar de la Pedrera

La Internaciaj Brigadoj estis trupoj de volontuloj venintaj el la tuta mondo por batali kontraŭ la faŝismo dum la hispana enlanda milito. Ili estis fonditaj en 1936 en Moskvo, kun rekrutcentro en Parizo, kaj batalis ĝis 1938 kiam ili estis malfonditaj.

La brigadanoj venis el 54 diversaj landoj kaj plimulto el ili ne estis soldatoj sed junaj laboristoj idealismaj.

Multaj el la esperantistoj partoprenintaj en la Popolaj Olimpikaj ludoj en 1936, integriĝis en la respublika flanko kiam ekis la milito, tie estis la ĝermo de la klopodoj krei batalionon de brigadanoj esperantistaj.

Kvankam ni ne tro certas pri la ekzisto de tiu bataliono, estas dokumentita la partopreno de pluraj esperantistoj inter la brigadanoj kaj la uzo de la internacia lingvo kiel interkomunikilo.

La plej konataj esperantistoj kiuj anis en la Internaciaj Brigadoj estis la germana verkisto Ludwig Renn, komandanto de la bataliono Thälmann kaj iniciatinto de la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV); la aŭstro Franz Haiderer, kiu sendis artikolojn en Esperanto al Ĉeĥoslovakio, kie estis tradukitaj kaj publikigitaj en la lokaj gazetoj. Similan agadon faris la polo Władysław Lekowski kaj la bulgaro Nikola Mladenov.

Estas dokumentita la uzado de Esperanto kiel skriba lingvo en la Internaciaj Brigadoj en diversaj dokumentoj kaj en la internacia korespondado, eĉ ekzistis cenzur-servo en la internacia lingvo.

Patroprenos en la omaĝo Gregor Benton, filo de Arthur Henry Benton, kiu venis al Barcelono en 1938 kiel brigadano. Antaŭ nelonge la Brita Nacia Arĥivo kompilis liston kie li aperas kune kun Eric Blair, reala nomo de George Orwell.

## **Historia vizito al Barcelono**

> Dimanĉon la 30an de oktobro je la 16a en placo Catalunya

Dum la irado oni konos la historian evoluon de Barcelono el ĝiaj originoj ĝis la nuntempo. Dum la gvidata ekskurso, oni ne nur konos la grandajn eventojn kiuj formis la estinton de la urbo sed ankaŭ etajn detalojn, anekdotojn, ne tro konatajn faktojn kaj kelkajn kiujn ni ĉiam taksis veraj sed kiuj fakte ne estas tiaj.

## VENDREDON LA 28AN DE OKTOBRO

	SALONO GRAU CASAS	SALONO JOAN AMADES
18:00 - 19:00		Ramon Rius. <b>Per què l'esperanto és tan atractiu?</b>
19:00 - 20:00		
22:00a	Koncerto de JoMo	

## SABATON LA 29AN DE OKTOBRO

	SALONO GRAU CASAS	SALONO JOAN AMADES
10:00 - 10:30	Kongresa Malfermo	
10:30 - 11:30	Zlatko Tišljar. <b>Lingva politiko de EU: Kontraŭdiro inter proklamita justo kaj praktikata maljusto</b>	Carles Vela. <b>Korusa ateliero</b>
11:30 - 12:30	Katalin Kováts. <b>Edukado de kvarlingva infano: naĝado kontraŭ la fluo</b>	Kevin de Laet. <b>Lingva kaj politika situacio en Belgio</b>
12:30 - 13:30	Jorge Camacho. <b>Kiel verki, traduki kaj legi poemojn</b>	Abel Montagut. <b>Ludo Talismanoj</b>
16:00-17:00	Abel Montagut. <b>Jules Verne kaj Esperanto: la lasta romano</b>	Guillem Sevilla. <b>Kunveno de ret-administrantoj de KEA</b>
17:00 - 18:00	Rubeno Fernández. <b>Lingvaj relativismo kaj minimumismo</b>	Laborkunveno de KEA
18:00-19:00	Ronda Tablo pri lingva diverseco en Eŭropa Unio	
		KEJ-sembleo
22:00a	Koncerto/balo de Kaj Tiel Plu	

ENIREJO	EKSTERE
Akceptejo kaj Libroservo	Mon Cardona. Ateliero pri popoldancoj

SALONO DELFÍ DALMAU	SALONO MANUEL CASANOVES	ENIREJO	EKSTERE
Jorge Camacho. Poezia Komisiono	Kongreseto	Akceptejo kaj Libroservo	Luphoma ludo
Jordi Solé. Delfi Dalmau, <i>Poliglotisme passiu i altres escrits</i>			
Zlatko Tišljar. Strategio de EEU	Kongreseto	Akceptejo kaj Libroservo	
Michael-Boris Mandirola. TEJO sin prezentas			Luphoma ludo
Katalin Kováts. Defioj de la nuntempa instruado de Esperanto			

## DIMANĈON LA 30AN DE OKTOBRO

---

	<b>EKSTERE</b>
10:00	<b>Renkontiĝo antaŭ la kongresejo</b>
10:30	<b>Enbusiĝo</b>
11:00	
11:30	Dani Cortijo, Gregor Benton, Kaj Tiel Plu. <b>Omaĝo al internaciaj brigadistoj</b> <i>En Fossar de la Pedrera</i>
12:30	<b>Irado al urbocentro / vizito de la tombejo</b>
16:00	<b>Renkontiĝo en la centro de Pl. Catalunya</b>
16:30	Dani Cortijo. <b>Historia vizito tra Barcelono</b>
19:00	<b>Koncerto de TutPEKo kaj Cor Acord</b> <i>En poezi-kafejo Horiginal</i>
21:00	<b>Poezia Vespero</b> <i>En poezi-kafejo Horiginal</i>

## LUNDON LA 31AN DE OKTOBRO

---

	<b>SALONO GRAU CASAS</b>
10:00	Jorge Camacho. <b>Poezia Komisiono</b>
10:30	
11:30	Michael-Boris Mandirola.
12:00	<b>Nitobe asocio por lingva demokratio kaj justeco</b>
12:30	Zlatko Tišljar. <b>Konkluda prelego</b>
13:00	
14:30	<b>Adiaŭa Tagmanĝo en Horiginal</b>
18:30	<b>Kaŝtanfesto en C.A.T.</b>

# ADIAŬA TAGMANĜO

*Lundon la 31a de oktobro je la 14:30a en poezi-kafejo Horiginal*

## **1a plado:**

**Salato**  
aŭ  
**Supo**  
aŭ  
**Pastaĵo aŭ legomoj**

## **2a plado:**

**Viandaĵo**  
aŭ  
**Fiŝaĵo**  
aŭ  
**Rizo aŭ legomoj**

## **Deserto:**

**Jogurto**  
aŭ  
**Frukto**  
aŭ  
**Dolĉaĵo**

## **Pladoj laŭ lundaj proponoj en la bazaro**



## LA MUZEO DE ESPERANTO DE SUBIRATS

Muzeo de Esperanto de Subirats estas granda privata kolekto de esperantaĵoj, kolektitaj de Luís Maria Hernández Yzal (1917-2002) kaj lia edzino, Maria Teresa Massana, en la vilaĝo Sant Pau d'Ordal, municipo Subirats, en Katalunio. Konata ĝi estas precipe pro sia riĉa kolekto de planlingvaj periodaĵoj, ĉefe Esperantaj gazetoj.

Ĝi estis inaŭgurita en 1968, en la apoteko de la vilaĝo, kie laboris Hernández. Pro la kresko de la kolekto, la familio konstruis apartan domon, kien la muzeo estis translokita. Post la morto de la fondinto, la aktivado de la muzeo malpliĝis, sed en aprilo de 2010 estis atingita interkonsento inter la familio, la patronaro de turismo de la municipo “Patronat de Turisme de Subirats” kaj la Kataluna Esperanto-Asocio, por ebligi regulan malfermon kaj organizadon de aranĝoj. La remalfermo eĥis en multaj amaskomunikiloj en Katalunio.

Laŭ indikoj de sinjoro Hernández Yzal, la muzeo posedis en septembro 1995 el 7.450 konataj titoloj de revuoj parte aŭ komplete 3.147. Tiam estis 12.851 jarkolektoj, el kiuj 6.929 kompletaj, kaj 9.401 libroj kaj broŝuroj (laŭ *Kataluna Esperantisto* 1996/1). Laŭ indikoj en *La Gazeto* de junio 1986 krome troveblis tiam i.a.: 1.215 turismaj broŝuroj, 1864 skatoloj kun korespondaĵoj de diversaj esperantistoj, 1625 esperantaj poŝtkartoj, 423 fotoj pri esperantaj okazaĵoj, 17 neeldonitaj manuskriptoj ktp. Inter la plej valoraj eroj estas manskribaĵoj de L.L. Zamenhof, ekzemple la manuskripto de *La Rabistoj*, kiun *La Revuo* ricevis la 11-an de aprilo 1907.

La 29an de aprilo 2011 konstituigis la Asocio de Amikoj de la Muzeo de Esperanto de Subirats (AAMES), kun la celoj protekti la unikan enhavon de la muzeo, disvastigi ĝin kaj agi la proponon “por publika faka biblioteko pri Esperanto”.



# LISTO DE ALIĜINTOJ

---

## Aliĝintoj ĝis la 20a de oktobro 2011, laŭ alfabeto ordo

1. Abel Montagut ----- Cervià de les Garrigues (Les Garrigues)
2. Adolf Fenollós Vicent ----- Paterna (Valencio)
3. Adrià Sánchez Vázquez ----- Moià (Bages, Katalunio)
4. Alain Favre ----- Lausanne (Svislando)
5. Alexandrine Omba Tshamena --- Kinshasa (DR Kongo)
6. Alfons Tur i García ----- Barcelona (Katalunio)
7. Anna Illa Molera ----- Sabadell (Vallès Occidental)
8. Anna M. Molera Urgellés ----- Moià (Bages, Katalunio)
9. Anna M. Sánchez Fernández ---- Mataró (Maresme)
10. Anna Muns ----- Barcelona (Katalunio Landaro)
11. Anna Sorribes Ortí ----- Tortosa (Katalunio)
12. Annarosa Andrei ----- Sarzana (Italujo)
13. Antoni Badia i Planes ----- Lleida (Segrià)
14. Aurora Roger i Ferreguela ----- Barcelona (Barcelona)
15. Bernard Legeay ----- Agen d'Aveyron (Francio)
16. Betty Legeay ----- Agen d'Aveyron (Francio)
17. Biel Murcia ----- Sabadell (Vallès Occidental)
18. Carles Vela i Aulesa ----- Barcelona (Barcelonès)
19. Carles Verdugo Rojano ----- Mataró (Baix Maresme, Katalunio)
20. Carlos Illa Casanova ----- Moià (Bages, Katalunio)
21. Carme Cànovas Baños ----- Sabadell (Katalunio)
22. Carmina Malagarriga de Broto -- L'Arboç (Baix Penedès)
23. Clara Baylina ----- Barcelono (Katalunio)
24. Damiano Rotondo ----- Francavilla Fontana (Italujo)
25. Dani Cortijo Astudillo ----- Barcelono (Katalunio)
26. Dani Rubió Amorós ----- Sabadell (Vallès Occidental)
27. Daniel Murcia ----- Sabadell (Vallès Occidental)
28. Didier Loison ----- Malakoff (Francio)
29. Dolors Álvarez Lozano ----- Barcelona (Barcelonès)
30. Edith Schönwälder Walter ----- Manresa (Hispanio)
31. Elena Milla i Saldon ----- Mataró (Maresme)
32. Éric Collignon ----- Sabadell (Katalunio)
33. Eulàlia Nuet i Badia ----- Barcelona (Barcelonès)
34. Eva Rodon i Armadans ----- Mataró (Maresme)
35. Evarist Sender ----- Barcelono (Katalunio)
36. Ferriol Macip i Bonet ----- Barcelona (Barcelonès)
37. Floreal Martorell ----- Donneville (Francio, ne oficiale Okcitanio)
38. Floreal Comte ----- Lafage / La Faja (Okcitanujo)
39. Francesc Ibàñez i Garcia ----- Mollet Del Vallès (Vallès Oriental - Cat)
40. Francesc Inglada ----- Tarragona (Katalunio)
41. Francesc Poblet i Feijoo ----- Barcelona (Katalunio)

42. Francesc Serra Baltiérrez -----Manresa (Catalunya)
43. Françoise Carrieu-Darrieux -----Tarbes (France)
44. Françoise Eriksen -----Ramonville St Agne (Francio)
45. Gemma Armadans i Gil -----Mataró (Maresme)
46. Gemma Ros Galimany -----Barcelona (Barcelonès)
47. Gerard Sugranyes -----Sabadell (Katalunio)
48. Gilbert Carrieu-Darrieux -----Tarbes (France)
49. Gregor Benton -----Llantwit Major (Kimrujo)
50. Guillem Sevilla -----Barcelona (Katalunio)
51. IsaBEL SANCHO i ROUSSET----Barcelona (Barcelonès)
52. Joan Inglada Roig -----Agulló-Àger (Noguera, Katalunio)
53. Joan Ramon Guifon Roset -----Barcelona (Catalunya)
54. Joel Rodon i Armadans -----Mataró (Maresme)
55. Jordi Aromi Martos -----Mataró (Barcelona)
56. Jordi Carbonell i Pinyol -----Barcelona (Barcelona)
57. Jordi Pedrós Cortasa -----Balaguer (Noguera)
58. Jorge Camacho Cordón -----Tajvano
59. Jorgos Comte -----Lafage / La Faja (Okcitanujo)
60. José I. Borrell -----Barcelona (Barcelonès)
61. Josep Franquesa Solé -----Lleida (Katalunio)
62. Josep Maria Milla i Saldon -----Mataró (Maresme)
63. Josep Nuet Badia -----Barcelona (Barcelonès)
64. Juan Antonio Giménez García ---Valencio (Valencio)
65. Jani Etesse -----Lafage / La Faja (Okcitanujo)
66. Jasmin Comte -----Lafage / La Faja (Okcitanujo)
67. Katalin Kováts -----Nederlando / Hungario
68. Kevin De Laet -----Antverpeno (Belgio)
69. Krishna Sivillà Rubio -----Manresa (Bages, Catalunya)
70. Lisa Eriksen -----Ramonville St Agne (Francio)
71. Llibert Puig Gandia -----Sabadell (Katalunio)
72. Lluís Aragay i Albaladejo -----Barcelona (Països Catalans)
73. Lluís Batlle i Rossell -----Santa Pau (Garrotxa)
74. Luma Comte -----Lafage / La Faja (Okcitanujo)
75. M. Àngels del Pozo Serrano -----Barcelono (Katalunio)
76. Manel Vinyals Allepuz -----La Sénia (Montsià)
77. Marco Menichietti -----Fucecchio (FI) (Italia)
78. Margarita Castro Jiménez -----Barcelona (Barcelonès)
79. María José Rodríguez Bertram --Sant Cugat del Vallès (Barcelona)
80. Marta Moliné Golovart -----Barcelona (Catalunya)
81. Martí Guerrero i Cots -----L'Hospitalet de Llobregat (Barcelonès, Catalunya)
82. M. Dolors Godoy Rotllens -----Cassà de la Selva (Gironès, Catalunya)
83. Michael Boris Mandirola -----Novara (Piemonto, Italujo)
84. Miren Elizagarai -----Barañain (Nafarroa)
85. Mon Cardona i Farrés -----Barcelono (Kataluna Landaro)
86. Montse Illa Molera -----Moià (Bages, Katalunio)
87. Montserrat Parera i Domènech --Sabadell (Vallès Occidental)
88. Montserrat Puigbarraca Arroyos Barcelona (Barcelonès)



89. Mundeta Godia Forcada -----Lleida (Katalunio)
90. Nicole Margot -----Lausanne (Svislando)
91. Olga Černišova -----Girona (Katalunio)
92. Òscar Codina Garriga -----Sabadell (Vallès Occidental)
93. Òscar Puig i Cánovas -----Sabadell (Vallès Occidental)
94. Pascal Dubourg Glatigny -----Berlin (Germanio)
95. Pedro M. Martín Burutxaga -----Blanes (La Selva)
96. Pere Navarro Rosinés -----Barcelona (Barcelonés, Catalunya)
97. Pere Palà Guerra -----Manresa (Hispanio)
98. Pilar Cardona Méndez -----Agulló-Àger (Noguera, Katalunio)
99. Rafael Ayala Gómez -----Barcelono (Katalunio)
100. Ramon Perera i Perera -----Barcelona (Kataluna Landaro)
101. Ramon Rius i Santamaria -----Barcelona (Katalunio)
102. Rosa López -----Terrassa (Barcelona)
103. Rosa Maria Rius -----Sabadell (Vallès Occidental)
104. Rubén Fernández Asensio -----Badalona (Katalunio)
105. Sebastià Ribes i Garolera -----Sabadell (Vallès Occidental)
106. Sílvia Simó Pujol -----Sabadell (Katalunio)
107. Sol Roca -----Tarragona (Katalunio)
108. Sylvie Roques -----Saint Jean (Okcitanio)
109. Teresa Alcalà Sanchez -----Barcelono (Katalunio)
110. Thiago Mori -----Barcelona (Catalunya)
111. Ugo De Riu -----Sarzana (Italujo)
112. Vicky Saludes i Cuberas -----Barcelona (Països Catalans)
113. Víctor Solé Udina -----Barcelona (Katalunio)
114. Xabier Rico Iturriotz -----Gasteiz (Eüskio)
115. Xavier Batllori Aguilà -----Barcelona (Barcelonès)
116. Xavier Murcia -----Sabadell (Vallès Occidental)
117. Xavier Rodon i Morera -----Mataró (Maresme)
118. Zlatko Tišljar -----Maribor (Slovenio)

# KATALUNAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

---



- 01a 1910 Sabadell (Vallès Occidental)
- 02a 1911 Tarragona (Tarragonès)
- 03a 1912 Terrassa (Vallès Occidental)
- 04a 1913 Olot (Garrotxa)
- 05a 1914 Sant Feliu de Guíxols (Baix Empordà)
- 06a 1915 Vilanova i la Geltrú (Garraf)
- 07a 1916 Reus (Baix Camp)
- 08a 1919 Manlleu (Osona)
- 09a 1921 Girona (Gironès)
- 10a 1923 Manresa (Bages)
- 11a 1924 Vic (Osona)
- 12a 1925 Ciutat de Mallorca (Mallorca)
- 13a 1926 Santa Coloma de Farners (Selva)
- 14a 1927 Sóller (Mallorca)
- 15a 1928 Vinaròs (Baix Maestrà)
- 16a 1933 El Vendrell (Baix Penedès)
- 17a 1935 Ripoll (Ripollès)
- 18a 1936 Manresa (Bages)
- 19a 1983 Sabadell (Vallès Occidental)
- 20a 1984 Olot (Garrotxa)
- 21a 1985 St. Cugat del Vallès (Vallès Occidental)
- 22a 1986 Lleida (Segrià)
- 23a 1987 Barcelona (Barcelonès)
- 24a 1989 Perpinyà (Rosselló)
- 25a 1991 Tarragona (Tarragonès)
- 26a 1993 Alcúdia (Mallorca)
- 27a 1995 Mataró (Maresme)
- 28a 1997 Figueres (Alt Empordà)
- 29a 1999 Manresa (Bages)
- 30a 2001 Girona (Gironès)
- 31a 2002 Sóller (Mallorca)
- 32a 2004 Ceret (Vallespir)
- 33a 2006 Amposta (Montsià)
- 34a 2008 Sabadell (Vallès Occidental)
- 35a 2011 Barcelono (Barcelonès)



